



# SUDFRANCIA STELO

N° 203 - 4a kvaronjaro 2012 - 4<sup>er</sup> trimestre 2012



**Bulteno eldonita de la  
Esperanto-Federacio de  
Langvedoko-Rusiljono**



*Sukcesan Novan Jaron  
per Esperanto!*

## **Enhavo:**

- P 2 : le mot du président
- P 4 : Novaĵoj el niaj grupoj
- P 8 : Visite de Michaël Bronstein,  
Esperanto en Parizo kaj regiono antaŭ la  
unua milito
- P 10 : Zamehofa tago en Avignono  
Prelego de Renée Triolle pri ineco en  
Esperantujo
- P 19 : Découverte : Les revues en E-o
- P 21: EDUKADO.NET
- P 22 : « feliĉan novan jaron ? »
- P 23 : 98-a UKE en Islando

**Printempa kunveno de la  
Federacio : sabaton la  
6an de aprilo 2013 en Béziers  
(Maison de la Vie Associative).**

Bonvolu sendi viajn informojn, fotojn artikolojn, kaj novaĵojn al Christian MOURE  
15, rue du Verdier 34120 TOURBES [xianmoure@orange.fr](mailto:xianmoure@orange.fr)  
Comité de relecture : Josée BOCCADIFUOCO, Marie-Blanche FONDRILLON, Arno LAGRANGE

## Le mot du président

Depuis 2007, c'est un bureau presque inchangé qui a géré la vie de notre association. Lors de notre prochaine Assemblée Générale qui aura lieu à Béziers le samedi 6 avril 2013, nous allons élire un nouveau bureau car après 6 années la plupart de ses membres ne souhaitent pas continuer. Je dois rappeler que conformément à nos statuts, le bureau est élu par les membres du Conseil d'Administration (dont vous trouverez la liste ci-après) parmi ses membres. Je les invite donc à être présents pour ce moment toujours important pour une association, puisqu'elle détermine l'avenir pour les années qui viennent. Comme chaque année également un tiers du Conseil d'Administration est renouvelé. Des projets sont en cours et seront mis en œuvre par la prochaine équipe : Semaine culturelle de Montpellier, Semaine de Sète ; le travail ne manquera pas. La présence du plus grand nombre sera un soutien important !

En cette fin d'année, je souhaite à tous une année pleine de réussite et de bonheur. Que notre idéal espérantiste puisse apparaître, en ces temps difficiles, comme une œuvre de progrès pour tous.

FELIÇAN JARON 2013

Jean-François PASSARELLA

**REABONNEMENT** : Pour ceux qui souhaitent recevoir notre bulletin en **version papier**, pensez à vous réabonner **dès maintenant** : tarif 10€ incluant la cotisation à la fédération à envoyer à Christian MOURE 15, rue du Verdier 34120 Tourbes. Pour recevoir dès parution la **version numérique** par internet : Cotisation à la fédération 2€ à envoyer à Christian MOURE  
[xianmoure@orange.fr](mailto:xianmoure@orange.fr)

**ASSEMBLÉE GÉNÉRALE du 6 AVRIL 2013** à la **Maison de la Vie Associative à Béziers** à coté de la gare.

Accueil à partir de 9h30 – Début de la réunion 10 heures Compte-rendus et élection des membres du Conseil d'Administration à renouveler- Questions diverses.

Repas sur place tiré du sac.

Après-Midi : 14h Réunion du Conseil d'Administration pour élire le nouveau Bureau qui se réunira ensuite.

\* \* \* \* \*

Promenado de la C.B.E. en Puissalicon



Mi igis la retejon de la federacio nun redaktebla. Temas pri spipo: se vi deziras kontribui, bonvolu kontakti Oliveron ([oli.manfredi@laposte.net](mailto:oli.manfredi@laposte.net)) kaj li donos al vi redaktajn rajtojn. <http://esperanto-languedoc-roussillon.fr>  
Momente la retejo entenas jenajn paĝojn, al kiuj povos aldoniĝi ĉiuj necesaj rubrikoj kaj artikoloj : [Hejmpaĝo](#) > **Mapo de la retejo**

#### La Federacio

##### **Artikoloj**

- [La Fédération Espéranto de Languedoc-Roussillon](#)
- [Sud - Francia Stelo](#)
- [La Federacio Langvedoko-Rusiljono](#)

#### Niaj kluboj

##### **Artikoloj**

- [Kursoj](#)
- [La kluboj](#)

Arno Lagrange

*Elektitaj/élus la 18an de aprilo 2010 en Vergèze  
(renovigo/renouvellement en 2013)*

Bichon Véronique

Carbonnel Colette

**Mouré Christian** « redaktoro/rédacteur » de SFS

(15 rue du Verdier 34120 Tourbes [xianmoure@orange.fr](mailto:xianmoure@orange.fr) )

**Passarella J-François** prezidanto : président

(10 passage J. Ferry 34290 SERVIAN [jf.passarella@free.fr](mailto:jf.passarella@free.fr) )

**Perez y Sanz Maria** kasistino/trésorière

(13bis, rue Haute 30310 Vergèze [maria.perez@orange.fr](mailto:maria.perez@orange.fr) )

*Elektitaj/élus la 21an de majo 2011 en Béziers  
(renovigo/renouvellement en 2014)*

Bernard Francis, Bernard Monique, Boccadifuoco Josée, Bourquin

Frédéric, Eysseric Serge, Mraihy Zohra

*Elektitaj/élus la 31an de marso 2012 en Nimes  
(renovigo/renouvellement en 2015 )*

Banaszek Evelyne, Bony Jeannine, Esclapez Laurence, Hénin Jean

**Arno Lagrange** sekretario/secrétaire:

([arno.raymond.lagrange@gmail.com](mailto:arno.raymond.lagrange@gmail.com))

Taupiac Pierre

### Zamenhofa tago en Béziers

La 15an de decembro, 29 personoj ĉeestis en la MVA de Béziers, kaj gaje partoprenis en la Zamenhofa tago.

Ni retrovis niajn amikojn el Montpellier, Jean-Pierre el Combejean, Colette kaj Arno el Aude. Genevieve G. invitis tri amikojn ne esperantistojn.



Matene post kafo, teo, kukoj, Laurence akceptis la gastojn kaj faris interesan proponon. Efektive por kuniĝi estas malfacile decidi du sinsekvajn sabatojn, ĉefe en decembro. Do eble ni povus agi tiel : unu jaron ekzemple ni organizas decembre feston en Beziars kaj alian daton (karnavalo, reĝoj tago...) en Montpellier. La sekvontan jaron ni povus intersanĝi. Ni parolos pri tiu ideo dum la federacia kunveno.

Laŭ la programo Martine kaj Veronique per lumbildoj prezentis la kongreson kaj sian vojaĝon en Vjetnamio. Belaj pejzaĝoj, interesaj

klarigoj pri la vivo ... Ni estis pretaj pripari niajn valizojn por aviadili ĝis la Baie d'Halong aŭ la kamparaj vilaĝoj.

Post la laceco de tia vojaĝo ni trinkis kaj manĝis. Kiel kutime ĉio estis tro abunda sed tamen tre bona.

Tagmeze la plenaj ventroj ne malebligis la ludan parton. Tri skeĉoj mobilizis preskaŭ la tutan grupon de Beziars. Kelkaj memoraj truoj sed "perfektaj" aktoludoj ĝojigis la publikon. La enigmoj konfuzigis niajn mensojn tamen kelkaj viglaj ludantoj (preskaŭ ĉiam la samaj) gajnis la donacetojn. La poemoj de Fernande kaj Jose ripozigis nin. La ludo "La tumultaj seĝoj" amuzis la publikon. La dek partoprenantoj faris gestojn petitajn de la ludmastrino. Evidente oni rimarkis multajn stultajn erarojn ĉar la agoj estis malsimplaj. Du kantoj kunigis nin en feliĉa etoso.



La Biteranoj dankis siajn geamikojn kaj jam pensas : "Kiel ni faros, por ke nia sekvonta festo estu ankoraŭ pli


bela ? " La tri neesperantistoj estis tre kontentaj pri la amika etoso. Tamen ni diris al ili, ke la lernado de Esperanto estos pli serioza afero, sed ke la Esperantitoj ŝatas kunveni,

babili, promeni kune. Ni esperas, ke ili lernos la lingvon.

Finfine ni disiris feliĉaj.

Cercle Biterrois d'Espéranto

\* \* \* \* \*



### Un nouveau livre bilingue : **L'Épreuve – La Elprovado**

Roger Condon est né en 1941 à Saint-Alban-sur-Limagnole en Lozère. Une carrière de commercial qui, chemin faisant, l'amena à devenir responsable administratif d'un service, poste qu'il occupa jusqu'à son départ pour la retraite en 2004. Par hasard, il rencontra l'espéranto en 2005 et s'en est passionné. Prix : 25,00 € - 386 pages - ISBN : 9782748384369 – Roman

## CENTRE CULTUREL ESPERANTO DE MONTPELLIER

Siège social : chez Mme Reine Céliqua Le Saint-Hubert B 44

31, Rue des Chasseurs

34070 MONTPELLIER

### **TRADICIA FESTO DE LA ESPERANTISTOJ : LA ZAMENHOF TAGO**

SinJORINO Klara Zamenhof naskis etan bebon la 15-an de decembro 1859, en Bjalistoko, litova urbo en tiu epoko, nun pola urbo. Oni diras, ke s-ino Zamenhof estis juna agrabla virino, eĉ petolema : do, la infano Lejzer –Lazare- kreskis en ĝoĝa familia etoso.

Kiam, kie, pere de kiu la festo de la naskiĝotago okazis la unuan fojon ? (Oni serĉos !)

Nun, en la tuta esperanta mondo, oni omaĝas al Zamenhof en decembro, pli malpli la 15-an. Ĉu oni povas skribi, ke tiu dato estas la nacia festo de Esperantujo, la virtuala lando de la esperantistoj ? Ĉu la Z-aj T-oj similas unu la alian ? Jes, pri la koro, pri la ĝoĝo !

En Montpellier, 16 personoj kunvenis, el kiuj 5 ge-junuloj, ĉiuj studentoj. Sed, malfeliĉe, niaj fidelaj

amikinoj de Béziers neĉeestis pro striko en stacidomo de ilia urbo.

Frandaĵoj por la partoprenantoj ŝajne plaĉis: kafo, teo, kaj precipe ĉokoladoj, kiuj refervorigas la etoson. Baldaŭ povis komenciĝi la arta parto de la festo.

Por digne malfermi la kunvenon, samideanino Hanna kantigis nin *La Espero*-n, oficialan himnon de la movado, kaj aliajn kantojn. Niaj junaj ge-amikoj Alice, André kaj Diane ludis skeĉon verkitan de Julio Baghy, humuraĵojn, ege ŝatatajn de ĉiuj, kaj fine ili kantis akompanataj de la gitaro de André. Poste, ni aŭdis la profundan voĉon de Olivier (ĉu Olivarbo ?), kiu akompanis sian kanton de gajeta kaj sprita danco. Dankon, amiko ! Per sia firma voĉo kaj ĉiam klara elparolo, nia prezidantino Josée legis poemon de

William Auld kaj fine poemon de poetino, esperanta Biteranino, Fernande Terral. Gratulojn por tiu eklektismo. Ĉiuj artistoj, tiel, omaĝis al la kreanto de la internacia lingvo, kaj la spektantoj ankaŭ omaĝis al la artistoj.

Post la omaĝo, la ludo: « kiu mi estas? » Skribita sur gluataj etiketoj ornamente la fronton de kelkaj samideanoj, nomo de fama homo, aŭ de besto, aŭ de floro, ... La posedanto de gluaĵo devas meti demandojn por diveni -aŭ ne -la vorton skribitan sur sia fronto. Estas amuza, vigla, paroliganta ludo, kaj ĉiuj bone ridas. La gajnantoj -fakte ĉiuj - ricevis donaceton, spingleton aĉetitan de Josée dum esperanta renkonto.

Fine, ĉiuj, kiel la Tri Magoj, metis sur la tablon donacojn, diverspecajn kaj delicajn, kunportitajn por la plezuro de la geamikoj. Laŭ la

komuna opinio, honorega mencio al tiuj, kiuj preparis kukojn. Kun sento de amikeco kaj frateco, tiel finiĝis nia Zamenhofa Tago, atendante la venontan.

Belajn familiajn festojn al ĉiuj, ĝis la revido... kiam? Vidu: ni kunvenos la 19-an de januaro, la 16-an de februaro, la 16-an de marto, la 13-an de aprilo, la 18-an de majo, la 15-an de junio.

Alia dato: la 6-an de aprilo, Federacia Kunveno en Béziers. Telefonu por la kunveturado.

Ankaŭ pensu membriĝi al la asocio: Aliĝo + abono al S.F.S., papere: 22 eŭroj;

Aliĝo + abono al S.F.S., rete: 16 eŭroj;

Simpla aliĝo: 14 eŭroj.

La prezidantino kaj la sekretariino

## Nova Esperanto-kurso ekis en Montpelliero, suda Francujo Plu moviĝas la movado

**M**ardon la 23-an de Oktobro 2012 ekis en Montpelliero (suda Francujo) nova Esperanto-kurso por komencantoj en liberecana libr- kaj kunvenejo, kiu nomiĝas « Askaso-Durruti ». En tiu ejo troviĝas la libraro de la fama anarĥiista historiisto Abel Paz, kiu donacis ĝin al liberecana grupo de Montpelliero.

La celo de la asocio « Askaso-Durruti » estas disvastigi la liberecanajn ideojn. Antaŭlonge esperantista ano de tiu asocio sciigis al mi, ke se esperantisto proponus sin por gvidi Esperanto-kurson, la asocio verŝajne tiucele disponigus sian ejon.

Post longa pripensado, hezitado kaj pluraj instigoj de geamikoj miaj, mi finfine partoprenis la unuan kunsidon de la asocio kaj proponis, ke mi kiel eble plej frue ekvidu Esperanto-kur-

son. Ĉiuj anoj konsentis, kelkaj ĉe vigle, kaj iu ĉe proponis al mi, ke mi partoprenu en retpaĝaro pri anarĥiismaj esploroj, kiun li estras.

La 23-an de Oktobro do ekis la kurso. Ĝin partoprenis pli-mapli dek homoj, laboristoj, senlaboruloj kaj studentoj, inoj kaj viroj. La etoso estas bonega, des pli, ke mi antaŭtimis, ke la kurso estos enuiga pro malsperto kaj mallerto miaj. Tute male, ĉio glate iras, kaj la Ĉe-metodo videble plaĉas al la gelernantoj.

London la 12-an de Novembro vizitis la kurson SAT-ano Jurgo Alkasaro, kiu venis Montpellieron por prelegi pri la nuna situacio en Hispanujo. Li diskonis al la gelernantoj tekstojn, kiuj bedaŭrinde estis tro malfacilaj por ili. Li tamen klarigis ĉion per simplaj frazoj. Tiel la gelernantoj povis ĝui inter-

kompreniĝon post du lecionoj. Ja neperfekta estis la interkompreniĝo, sed tamen ĝi certe pruvis al la ĉeestantaro, ke Esperanto funkcias kaj instigis al plua lernado.

Kamarado Jurgo ankaŭ partoprenis la manifestacion, kiu okazis la 14-an de Novembro. Li kunportis grandegan kaj belegan flagrubandon en... Esperanto! Tuja rezulto: pluraj scivolemujoj demandis al ni, pri kiu lingvo temas, kaj pluraj intencas viziti la venontan kurson. Ni baldaŭ estos 15!

La kurso okazas ĉiumarde, de la 20-a ĝis la 21-a kaj 30 en:

Centre Ascaso-Durruti  
6 rue Henri René  
34000 Montpellier

ANDREO HOARO

## Esperanto Nîmes centre culturel espérantistes nîmois

Plej elkorajn bondezirojn por la nova jaro.

<http://esperantonimes.wordpress.com/>

**Siège de l'association/Asocia sidejo:**

185, chemin du Mas Bonnet

30000 NÎMES Tel: **09 54 01 01 30**

mobile: **06 01 77 63 40**;

Courriel:

[frederic.bourquin@laposte.net](mailto:frederic.bourquin@laposte.net)

Responsable du site Internet:

Frédéric BOURQUIN



Claudine COULOMB, Frédéric BOURQUIN kaj Jean-Pierre LOPEZ (starante)



Asocia forumo en Nîmo la 8an de Septembro 2012

Forum des associations à Nîmes le 8 septembre 2012

Propagando pri Esperanto

Propagande en faveur de l'espéranto

*/Propagando pri esperanto*

Septembro 2012: Raportado pri

Esperanto en Radio Sommières

*(Intervjuo de F. BOURQUIN):*

Septembre 2012: Reportage de Radio

Sommières

*(entretien avec F. BOURQUIN):*

[http://soundcloud.com/ev-radio-](http://soundcloud.com/ev-radio-sommieres/reportage-sur-le-forum-des)

[sommieres/reportage-sur-le-forum-](http://soundcloud.com/ev-radio-sommieres/reportage-sur-le-forum-des)

[des](http://soundcloud.com/ev-radio-sommieres/reportage-sur-le-forum-des)

\*\*\*\*\*



Le nouveau Tintin est arrivé ! « **La templo de l'suno** » est désormais traduit en espéranto !

**La aventuroj de Tinĉjo - La templo de l'suno** Après *Le Crabe aux pinces d'or* en 1981, *L'Île Noire* en 1987, *Tintin au Tibet* en 2005, *Le temple du Soleil* est le quatrième album du célèbre journaliste belge à être traduit en espéranto.

**Editeur : Esperanto france**

**ISBN : 978-2-203-06067-8**

**Format : 227 X 175 mm**

**Nb pages : 62 Prix : 12,50 € (+ 2,50 € de frais d'envoi)**

## Visite de Michaël Bronstein



Michaël Bronstein est russe. Il est également espérantophone et connu comme un des plus grands chansonniers de la langue internationale.

Programme: **jeudi 24 Janvier**

**15-18h conférence "Retrospektivo de rusaj festoj" à la MVA de Béziers**



18-19h apéritif au bureau du CBE  
19h 30 repas (pas encore de lieu)

**vendredi 25**

**janvier** : 10h30 visite de Béziers,  
12h 30 repas, 14h 11 départ

Festotagoj, ĝojigantaj la vivon de homo post streĉa laboro, estas kutimaj kaj atendataj en ĉiuj landoj.



Sed versimile nur la rusoj posedas tiun ravan tohuvabohuan festaron, en kiu kirle miksiĝis la festoj paganaj kaj kristanaj, internaciaj kaj komunistaj, ligitaj al historiaj eventoj kaj truditaj de la stata gvidantaro. Bonvenon al la prelego, kie la aŭtoro, uzante vodkon, gitaron kaj videon, faros provon iel-tiel sistemigi la festaron, estimatan en Rusio ĝis la nuna tempo.

\* \* \* \* \*

**Esperanto en Parizo kaj regiono antaŭ la unua milito**

*Laŭ la « monata bulteno de la grupo el Parizo »*

Jean-Pierre (J.P.) membro de la C.B.E. donis al nia grupo dikan libron : « La monata bulteno de la grupo el Parizo », de oktobro-novembro 1906 ĝis decembro 1910. J.P. dum multaj jaroj loĝis en la ĉefurbo kaj bone esperante teatris.

En tiu libro oni uzas pli la francan lingvon ol Esperanton sed ĝi interesas min eĉ se mi ne povas legi detale la tuton. Oni konstatas la amplekson, la kreskon de esperanto antaŭ la unua milito en la pariza regiono, kaj verŝajne en aliaj regionoj.

La pariza grupo naskiĝis en 1900 kaj rapide multaj personoj aliĝis, multaj grupoj ekzistis en ĉiuj distriktoj, kvartaloj, ĉirkaŭurboj.



## La kluboj

Multnombraj korporacioj, metioj, profesioj kreis siajn grupojn; ekzemple policianoj, kuracistoj, deputitoj, instruistoj, verkistoj, laboristoj, erudicioj, artistoj, industrioj, religiistoj, militistoj kaj societoj kiel « ruĝa kruco ». En la komenco, la virinoj havis siajn proprajn grupojn. Poste ili kuniĝis kun la viraj grupoj.

Sinjoro Pelletier estis la unua esperantista koĉero. Li surmetis verdan stelon sur siajn ĉapelon, lanternon, kapon de la ĉevalo. La esperantistoj pagis malmulte liajn servojn. En restoracio « à l'Espéranto » la kelnero parolis la lingvon.

## La komerco

Iom post iom, la komercistoj uzis esperanton por komuniki: « La Samaritaine, Les Grands Magazins du Louvre, Les Nouvelles Galeries de la Ménagère ». Ĉiuj korespondis per esperanto. Kelkaj vendis esperantajn objektojn (stelo, flago, ludo, skribilo, albumo, ŝultrotuko) kaj evidente esperantistoj havis rabatojn en tiuj magazenoj.

## Festoj

La geesperantistoj ŝatis kuniĝi por distriĝi, manĝi, promeni, vojaĝi, ludi teatraĵojn aŭ kanti, eĉ danci.

-monataj mondanaj kunvenoj: ludoj, prelegoj, muziko. Oni trinkis teon, ĉefe kun virinoj.

-monataj manĝoj kun distra parto en ĉiuj grupoj (tre multnombraj partoprenantoj).

-la « Barĉo ». Sinjoro Cart kaj amikoj kreis tiun renkontiĝon. Oni

manĝis « Barĉon », supo kun lardo kaj beto. Nur tiuj, kiuj posedis «ateston pri kapableco» partoprenis ĉar oni nur babilis esperante. La rendevuo estis en restoracio, strato S<sup>t</sup> Martin, prezo 2,15 frankoj .

-ĉiun lundon, je la 9<sup>a</sup> vespere, la kabareto « Esperanto » de Montmartre akceptis publikon por « aŭdi, laŭdi aplaŭdi » la famajn multnombrajn geartistojn « eniro senpage por ĉiuj ; trinkaĵoj je la ordinaraj prezoj. »

-En marto 1909, dum la unua flora batalo de la karnavalo en Nice, oni multe admiris la esperantan ĉaron kun blanka kaj verda dekoracio. Sur la ĉaro la geesperantistoj surmetis blankajn kaj verdajn vestaĵojn kaj blankajn ĉapelojn. Ili ĵetis centojn da floroj sur la publikon, oni vigle aplaŭdis ilin.

-promenadoj, vojaĝoj.

La esperantistoj ofte organizis ekskursojn, renkontojn, vojaĝojn, partoprenis en kongresoj. La grupo tre aktive vivis.

Edukado, eminentuloj. Ĉiuj kluboj instruis en diversaj lokoj: lernejo, fakultato (eĉ en Sorbonne), urbodomo, laborejo.

Ĉiujare oni organizis konkursojn kaj oni donis la premiojn en la Sorbonne. En novembro 1910, Sinjoro Paul Painlevé, deputito en Parizo, membro de la Instituto prezidis la ceremonion. Militista orkestro unu fojon ludis la himnon de esperanto.

Sinjoro Viviani, ministro de la laboro prezidis prelegon por lernantoj de « Cours Complémentaire » (strato

S<sup>t</sup> Jacques). En la Medecina fakultato, Sinjoro Pierre Carret prezentis tezon « Utilité et possibilité d'une langue internationale auxiliaire en médecine. » Li obtenis la plej altan mencion (très bien).

Favore aŭ uzante esperanton, kelkaj Francoj aŭ eksterlandanoj (inter multnombraj aliaj) :

*Ferdinand Buisson (ligue de l'enseignement), Zinoviev (politique russe), Pujula (Catalan), Sinjorinoj : Haskell (U.S.A.), Augé (député Hérault).*

En 1909 la reĝo de Hispanujo estis « Honora prezidanto » de la kongreso en Barcelone.

### Reklamoj

En tiu libro, oni trovis multajn reklamojn por magazenoj de profesiuloj, kiuj konsentis rabatojn al geesperantistoj. Mi tradukas nur unu el ili: « memoro. La pastro de Dampierre-s-Bouly (Nièvre) indikas, kiel akiri eksterordinaran memoron kaj facile lerni la lingvojn. Senpage informoj ».

En la gazeto vivis grupoj kaj individuoj. Inter esperantistoj foje,

okazis disputoj kaj debatoj pri gramatiko, Ido, elekto de la estroj, kotizoj. Pri la lingva disputo, la libro entenis kopion de letero de L.L.Zamenhof « al ĉiuj esperantistoj » (Varsovio, 18<sup>an</sup> de januaro 1908)

### Konkludo

Ĉu ni retrovos similan epokon ? Ĉu ni sukcesos grandigi esperanton kiel niaj unuenaskitoj ?

Fine de tiu longa artikolo mi proponas la lastajn versojn de poemo de Sinjoro Paul Weil (novembro 1908), kiu reprezentis la menson de esperanto en tiu epoko :

*Espéranto d'amour, langage de demain,*

*Etoile symbolique aux yeux du genre humain ;*

*Oui, quand dans l'univers tous tes fervents apôtres*

*Auront dit : « parlez-vous, hommes , les uns aux autres,*

*Ton rêve, Espéranto, sera réalisé  
Car les peuples auront fraternisé.*

Line el Béziers

\* \* \* \* \*

## **Zamehofa tago en Avignono la 9an de decembro 2012-12-16**

Akcepto je la 9a : Francis proponis kafon, teon kaj biskvitojn

Libro-servo : La asocio « réinsertion et espéranto » kun Jean-Pierre kaj Claudine ĉeestis alportinte multajn librojn inter alie de Cherpillod, kaj ankoraŭ librojn por instrui aŭ lerni, ktp...

Rose-Marie proponis brokantaĵojn, tio estas malnovaj libroj, sed ŝatataj....

Céline « Esperanto-info » kaj tablotuketoj....

Tagmanĝo : ĉirkaŭ tridek personoj. Manĝante Oni priparolas.....

Posttagmeze skeĉoj el « la eta princo » kaj de René Schwartz. Ankaŭ oni multe kantis.....

## Prelego de Renée Triolle pri ineco en Esperantujo

### L'espéranto au féminin : (el Esperanto-Provence)



L'espéranto, langue construite fête ses 125 ans. Né à la fin du XIX<sup>ème</sup> siècle il reflète la situation de la femme, notamment dans les proverbes (proverbaroj de Zamhenof) où la femme reste au foyer, joue de ses charmes et est une langue de vipère.

**On note dans quelques définitions du PIV des explications sexistes, et nombre de méthode d'apprentissage montre la femme à la cuisine et le mari au salon en train de lire le journal !**

Neutre politiquement en permettant à chaque langue d'exister et aux hommes de discuter sur un pied d'égalité, l'espéranto est-il neutre grammaticalement ?

Contrairement au français, l'espéranto a une seule forme pour les adjectifs, les articles, les possessifs, les verbes. Quant aux noms, ils se terminent tous par -o pour indiquer soit des objets, soit des

personnes. Le trait de génie, c'est d'ajouter un suffixe -in'o qui signale clairement qu'il s'agit d'une femelle (parler du chat terme générique : on indique le sexe par in-o pour la femelle ou par vir- pour le mâle : kato, virkato, katino.)

Quelles femmes ont compté dans le mouvement ?

l'épouse de Zamenhof, Klara Silbernik dont la dot permet l'édition du Premier livre ou la fille Lidja Zamenhof qui enseigne partout l'espéranto par la méthode directe, traduit les classiques polonais et s'investit dans la religion Bahaa (un monde, un peuple, une langue) .

Parmi les auteurs, quelques femmes-pionniers en littérature dont Hilda Dresen ou fondatrice du mouvement catholique.

Parmi les auteurs actuels, Eli Urbanova, poète et romancière tchèque ; Marjorie Boulton, poète en espéranto et anglais ; Spomenka Stimec, Croate, journaliste, romancière et traductrice du croate en espéranto ; Anna Löwenstein, auteur de romans historiques, engagée pour l'allaitement maternel.

Quelle place occupent les femmes dans le mouvement ? C'est le reflet de notre société ; presque pas de filles en Afrique, parité au Bureau de Universala Esperanto-Asocio, première femme vice-président de UEA en 1994. Dans un couple, c'est souvent l'homme qui cotise ou occupe un poste à responsabilité alors que sa femme se contente des

"basses besognes" (accueil d'étrangers, bibliothèque etc).

### Esperanto inece

Esperanto naskiĝis fine de la XIXa jarcento .Kreite de viro, Ludoviko Zamenhof, ĝi respegulas la tiaman sintenon, ekz. tra la proverboj. Esperanto celas esti neŭtrala, ĉu ankaŭ gramatike ĝi estas neŭtrala ? Sola aparta trajto estas la sufikso -in- por distingi virinon de viro ekz patr-o /patr-in-o.

Kiuj virinoj grave rolis en la movado? Unue la edzino de Zamenhof, Klara Silbernik, kiu akceptos doni sian monon por eldonado de la "Unua libro" kaj dum la tuta vivo vivos tre modeste ; kaj la filino, Lidja, kiu instruas per rekta metodo, tradukas polajn klasikajn verkojn, ekz "Quo vadis" de Sienkiewicz aŭ "Noveloj " de Boleslas Prus. Ŝi engaĝiĝos en religion Bahaa, kiu celas "unu mondon, unu lingvon".

Kiuj virinoj rolas en literaturo ? la pionierinoj, i.a Hilda Dresen, kaj nun ekz Elia Urbanova, ĉeka poeto ; Marjorie Boulton el Britio, Spomenka Stimec, kiu verkas ĵurnalisme " Kroata milita noktlibro " aŭ "Nesenditaj leteroj el Japanio" aŭ romanece pri amo aŭ familio "Ombro sur interna pejzaĝo" " Tilla" " Tena" ; ŝi ankaŭ tradukas de kroata al esperanto kaj esperanto iĝas pontlingvo; Anna Löwenstein, kiu verkas historiajn romanojn " La ŝtona urbo" "Morto de artisto" .

Kiun rolon ludas virinoj en la movado ? Ili respegulas la ĝeneralan

sintenon : samnombraj en la estraro de Universala Esperanto-Asocio, apenaŭ kelkaj en Afriko. Ofte nur la edzo kotizas kaj havas administran rolon dum la edzino kontentiĝas pri dommastraĵoj !



### El Vikipedio

Klara Silbernik: **Klara ZAMENHOF**, edzino de L. L. Zamenhof. Naskiĝis kiel f-ino Silbernik (En Esperanto ŝia denaska familia nomo foje estas literumata "Zilbernik") la 6-an de oktobro 1863 en Kowno, mortis la 6-an de decembro 1924 en Varsovio. Senhezite fordonis sian tutan doton por la eldono de la Unua Libro, 1887. Estis ĉiama kunlaboranto kaj helpanto de la edzo, ofte plenumis liajn administrajn kaj sekretariajn taskojn. Ankaŭ post la morto de Zamenhof aktive partoprenis la movadon. Danke al ŝia kunhelpo, fondiĝis la Esperanta-Rondo Konkordo en Varsovio. Ĉeestis ĉiujn UK ĝis la Viena 1924, kiu estis ŝia lasta renkontiĝo kun la Esperantistaro.

Bazita sur la teksto de E. W. en Enciklopedio de Esperanto.

**Klara (Kejla) ZAMENHOF**, naskita Zilbernik (1863-1924). Filino de Aleksandro (Sender) Lejbovich Silbernik kaj Goda Mejerovna Silbernik.



Esperantistiĝis en 1887 aŭ pli frue. "Mia edzino plej fidele kaj plej sindone partoprenis en ĉiuj suferoj kaj malagrabloj, kiujn Esperanto donis en la unuaj jaroj" (Ludoviko Zamenhof).

**Lidja Zamenhof: Lidja [Lidia] ZAMENHOF**, la plej juna filino de la iniciatinto de Esperanto, L. L. Zamenhof, naskiĝis la 29-an de



januaro 1904 en Varsovio, tiam en la Rusa Imperio. Ŝi estis agema antaŭeniganto de Esperanto kaj ankaŭ de Homaranismo, tipo de religia kaj etika mondcivitaneco formulita fare de ŝia patro.



Ĉirkaŭ 1925, ŝi estiĝis ano de la Bahaa movado. En malfrua 1937, ŝi iris al Usono por instrui la Bahaan religion kaj ankaŭ Esperanton.

En 1938, pro enmigradaj problemoj en Usono, ŝi devis reiri al Pollando, kie ŝi daŭre instruis kaj ankaŭ tradukis Esperanten multajn Bahaajn verkojn.

Jud-devena, ŝi estis murdita en la nazia ekstermejo Treblinka iam post somero 1942.

Hilda Dresen: **Hilda DRESEN**, (pseŭdonimo Hido) (naskiĝis la 11-an de majo 1896 en Kolga, Harjumaa, mortis la 5-an de februaro 1981 en Tallinn) estis esperantista poetino, estonino, sovetiano, radiotelegrafistino.

### **Esperanta poetino kaj tradukistino**

Dresen estis esperantisto de 1913 kaj kunlaborinto de la literatura periodaĵo *Literatura Mondo*. Ŝi ektradukis en 1922 kaj tiuepoke estis

la plej aktiva verkistino de Esperantujo. Ŝi ankaŭ estis honora membro de Universala Esperanto-Asocio (UEA).

Lajos Tárkony (tiuepoke ankoraŭ sub la nomo Ludwig Totsche) juĝas en Enciklopedio de Esperanto en 1934:



"Ŝiajn verstradukojn karakterizas instinkte radika ritma sento, riĉa rimtrova preteco, vivanteco de la lingvo, kaj ia individueca ĉarmo de l' esprimmaniero. Tamen kelkfoje sentiĝas ia stila rigideco, ia lingva malflekseblo en ŝiaj tradukoj. Ĉi tiu manko ne ĝenas en ŝiaj originalaj poemoj, kiuj plejparte aperis en *Literatura Mondo*. En ili ekparolas la melankolio de l' malgajaj nordaj pejzaĝoj, melankolio, kies sincerecon kaj sanecon pruvas ĝuste la maloftaj, sed impetaj ekjubiloj de l' vivĝo kaj vivovolo. Pri ŝia vasta kulturo atestas ŝia plurlingva literatura orientiĝo. (Ŝi tradukis el la estona,

liva, rusa, germana lingvoj.) Ŝiajn tradukojn ampleksas la jenaj volumoj: Marie Under: *Elektitaj versaĵoj* (1929), J. Barbarus: *Horizontoj* (1931), *Estonaj kantoj* (1931), *Estona Antologio* (1932)."

Dresen ankaŭ kontribuis al la esperantlingva poem-antologio "Dekdu Poetoj" aperinta en 1934 ĉe la eldonejo *Literatura Mondo* sub redakto de Kálmán Kalocsay, kiu komentas ŝin kaj ŝian poezion tiel : « Ŝi rigardas sin plie tradukinto ol originala poeto. Ŝi ne estas prava. Ŝiaj tradukoj ja estas neproporcie pli multaj kaj ankaŭ pli konataj: kiu ne rememorus la belegan Visnapuu-tradukon:

*Orflava estas park', orflava estas koro,*

*Du paŝoj en pereo ora.*

*Orflava estas voj', orflava estas koro,*

*Jen paro en pereo ora.* -

sed laŭ mia sento, ŝia talento montriĝas plej libere ĝuste en ŝiaj propraj poemoj. En ili ŝia lingvo estas ankoraŭ pli elasta, pli esprimiva, pli harmonia.

Melankolio estas la grundtono de ŝia poezio. melankolio pri si kaj pri la homoj. Sed tio ne estas plorema sentimentaleco. Ĝi similis al la morna koloro de la ĉielo, tra kiu oni esperas, volas lumon. Tiu lum-espero donas tute apartan nuancricon eĉ al la grizo, kaj en ŝiaj printempaj bildoj ĝi tremas en la ĝojo de plenumiĝo.

En 1975 aperis ŝia traduko de la estona nacia eposo "Kalevipoeg". En la lastaj du jardekoj de ŝia vivo oni nomis ŝin "patrino de la estonaj esperantistoj".

## Verkoj

### • *Hilda Dresen en Vikifontaro* (Universala biblioteko)

- *Vintra luno; Norda naturo; Printempe; Subite; Paduso; Betulo; Supren; Vizaĝoj; Surstrate; Ĝena penso; Sensenteco...* (En Dekdu poetoj, 1934)
- *Adamson kaj lia verko*
- *Norda naturo* (1967)
- *Zamenhof*

Eli Urbanova: **Eliška "Eli" URBANOVÁ** (naskiĝis la 8-an de februaro, 1922 en Čáslav, Ĉeĥio - mortis la 20-an de januaro 2012 en Prago) estis ĉeĥa poetino en Esperanto, honora membrino de UEA, laŭ knabina nomo Vrzáková, instruistino kaj eks-akademianino. Kiel poetino Urbanová debutis en la jaro 1940, kiam librovendisto Malý en Čáslav eldonis ŝian lirikaĵon en la ĉeĥa lingvo *Zrcadlo* (Spegulo). En 1948 ŝi ellernis Esperanton kaj jam post kelkaj monatoj estiĝis tekstoj kaj versoj ... De tiam ŝi verkis multajn originalajn poemojn, el kiuj la plej bonaj atingis aprezon en Belartaj Konkursoj de UEA.

Eli Urbanová estas unu el fondintoj de Internacia Verkista Asocio en la

jaro 1956 kaj dum tri jaroj estis membro de juĝkomisiono por Belartaj Konkursoj. Inter 1986 kaj 1995 ŝi estis akademianino. En 2001 ŝi akiris OSIEK-premion pro *Hetajro dancas*.

Profesie instruistino, ŝi esperantistiĝis en 1948 kun Štefo Urban, ŝia edzo ĝis 1955 kaj aŭtoro de la versa fablaro Nova Ezopo (1961). Ambaŭ membriĝis en la Praga Esperanto-Klubo en 1949 kaj baldaŭ ekverkis en Esperanto. Jam en 1940 Urbanová aperigis poemaron en la ĉeĥa. En la periodo 1952-1957 ŝi ricevis dek premiojn, i.a. la unuan



premion pri poezio en la Belartaj Konkursoj de UEA en 1954. Fortan impulson al Urbanová donis ŝia amikiĝo kun Julio Baghy, kun kiu ŝi ekkorespondis en 1952 kaj kiu vizitis Pragon en 1956. Ŝi aperigis la poemarojn *Nur tri kolorojn* (1960), *El subaj fontoj* (1981), *Verso kaj larmo* (1986), *Vino, viroj kaj kanto* (1995), *Peza vino* (1996; dulingva, kun ĉeĥa traduko de J. Rumler), *El*

mia buduaro (2001), *Rapide pasis la temp'* (2003) kaj *Prefere ne tro rigardi retro* (2007). Ŝiaj poemoj aperis ankaŭ en la kolektoj *Kvarfolio* (1976) kaj *Eli Urbanová - nuntempa Esperanta poetino* (2005), kaj en *Esperanta antologio* (1958 kaj 1983). Ŝia literatura ĉefverko tamen estas *Hetajro dancas* (1995), ampleksa aŭtobiografia romano, kiu ricevis la OSIEK-premion en 2001. Urbanová multe artikolis pri Esperanto en la ĉeĥa kaj instruis la lingvon. En 1957 ŝi kunfondis Internacian Verkistan Asocion, kiu funkciis dekon da jaroj. Ĝin sekvis en 1983 Esperantlingva Verkista Asocio, en kiu ŝi ankaŭ membris. De 1975 ĝis 1980 ŝi estis juĝanto pri poezio en la Belartaj Konkursoj. En 2003 OSIEK dediĉis sian konferencon en Prago parte al ŝia verkaro. Ĝia prelegaro, *Intimaj temoj en Esperanto-beletro*, aperis en 2005. Urbanová estis membro de la Akademio de Esperanto 1986-1995. En 1996 ŝi fariĝis Honora Membro de UEA. Saman distingon ŝi ricevis de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en 1982.

### Listo de verkoj

- **Nur tri kolorojn** (1960 ĉe eldonejo Stafeto kun la antaŭparolo de Julio Baghy, ŝia iama korespondanto kaj favoranto).
- **El subaj fontoj** (ĈEA 1981)
- **Verso kaj larmo** (Iltis 1986)
- **Vino, viroj kaj kanto** (Fonto 1995)
- **Hetajro dancas** (Fonto 1995)

- **Peza vino / Těžké víno** (KAVA-PECH 1996) kun ĉeĥa traduko de Josef Rumler
- **El mia buduaro** (Fonto 2001)
- **Rapide pasis la temp'** (KAVA-PECH 2003)
- **Prefere ne tro rigardi retro** (KAVA-PECH 2007)

Marjorie Boulton : Doktorino **Marjorie BOULTON** [MAĝari BULtan], esperante **Marjorio Bultono** (naskiĝis la 7-an de majo 1924), estas angla aŭtorino, verkanta kaj en la angla lingvo kaj en Esperanto. Ŝia verkaro ampleksas poeziaĵojn, dramojn, novelojn, rakontojn kaj eseojn. Krome ŝi tradukas. Esperanton ŝi eklernis en 1949. Membro de la Akademio de Esperanto. Honora membro de UEA.



Universala Kongreso de Esperanto, Gotenburgo 2003. Humprey Tonkin kaj Marjorie Boulton.

La verkado de Marjorie Boulton estas matura kaj socie engaĝita. Ĝin



trapenstras varma tono kaj sincero. Evidentas ankaŭ ŝia impulsa formtrova kapablo kaj sento pri humuro. El la propra intimo ŝi lasas aperi siajn pasiojn kaj turmentojn, tiel nudigante antaŭ la leganto sian animon. Aliflanke per verkoj emoci-likrikaj ŝi prezentas kaj defendas sian idealisman humanismon.

Marjorie Boulton estas prezidantino de Kat-amikaro kaj ODES.

## Spomenka Stimec

**Spomenka** **ŜTIMEC** [spomenka ŝtimec] (naskiĝis en Orehovica la 4-an de januaro 1949) estas kroata verkistino, tradukisto, instruisto de Esperanto, kaj nuna sekretario de la Esperantlingva Verkista Asocio. Ŝi estas interalie konata pro ŝia verkado de originalaj esperantaj libroj.

Post la lernejoj ŝi translokiĝis al Zagrebo por ekstudi. En 1972 ŝi diplomiĝis pri la germana kaj franca lingvoj. En la sama jaro ŝi eklaboris profesie por Esperanto en la Internacia Kultura Servo kaj daŭrigis sian laboron tie ĝis 1994.

Ŝi eklernis Esperanton en 1964, 16-jaraĝe, per kurso gvidita de Zdenka Ivek en la gimnazio de Varaždina. Ŝi partoprenis sian unuan UK-on en Budapeŝto en 1966.

En la movado ŝi ekaktiviĝis kiam ŝi enmembrigiĝis en la Studenta

Esperanto-Klubo de Zagrebo (1967). Ŝi poste aktivis en TEJO kaj UEA, kaj interalie organizis la IJK en Sarajevo en 1973 kaj sekretario de TEJO-kongreso en Munster en 1974. Ŝi estis estrarano de UEA pri kulturo, kaj lanĉis la Tagon de Libro dum la UK.

Ŝi tradukis por pupteatroj kaj helpis en organizo de la Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) inter 1968 kaj 1982. Krome ŝi estis sekretario de la Kroata Esperanto-Ligo en 1995. Dum sia vivo ŝi gastprelegis en



multaj landoj (Francio, Svedio, Irano, Koreio, Japanio). Krome ŝi gastinstruis pri Esperanto en usonaj universitatoj Hartford kaj San Francisco (1993-2000).

Ŝi profesie gvidis plurajn E-kursojn en elementaj lernejoj de Zagrebo kaj Velika Gorica. Ŝi instruis mez- kaj altnivelan esperanton en kadre de la Kroata Esperanto-Ligo dum 2003 kaj 2004.

De 1995 ŝia familia bieno *Njeguš* en la vilaĝo Hrašćina-Trgovišće servas por Esperanto-aranĝoj.

### **Verkista vivo**

Ŝi verkis romanon, novelarojn kaj vojaĝopriskribajn rakontojn. Ŝia plej konata kaj eble plej grava verko estas la romano *Ombro sur interna pejzaĝo*, kiu kun delikata psikologio prezentas disiĝon de kunvivantoj. Ŝi verkis por pluraj revuoj, i.a. por la magazino MONATO. Dum pluraj jaroj ŝi uzis Esperanton kiel hejman lingvon.

Pluraj el ŝiaj vojaĝopriskribaj rakontoj estis disaŭditaj en la Kroata Radio.

### **Prezentoj de Esperanto**

En 2004 ŝi prezentis al la kroata Ministrejo pri eksterlandaj aferoj kroatajn verkojn tradukitajn per Esperanto en la ĉinan, persan kaj japanan lingvojn. Oni akceptis ŝin kaj gratulis al esperantistoj pro la laboro farita en la kultura kampo.

Ŝi nuntempe estas ano de la Akademio de Esperanto kaj loĝas en bieno en Kroatio.

**Anna LÖWENSTEIN** (naskiĝis en



Britujo en 1951) estas konata

esperantistino, kiu famiĝis interalie kiel redaktorino kaj verkistino.

Löwenstein laboris en la Centra Oficejo de UEA de 1977 ĝis 1981, kie ŝi redaktis la Jarlibron de UEA en 1981. Ŝi iĝis membro de la Virina Komisiono de UEA en 1979. Sub la nomo Anna Brennan ŝi estis fondinto kaj redaktoro de la revuo *Sekso kaj egaleco* de 1979 ĝis 1988, redaktoro de la facila parto de Kontakto (kaj krome verkinto de la listo de 1000 morfemoj uzataj en la facila parto) de 1983 ĝis 1986. Ŝia plej konata verko estas *La ŝtona urbo* (1999), historia romano, kiu aperis kaj en la angla kaj en Esperanto. En 2010 ĝi aperis ankaŭ en la franca, en traduko de Godeleine Logez. Ĝi temas pri kelta sklavino, portata al antikva Romo. La romano aperis en pluraj rapide sinsekvantaj eldonoj.

En 2006 ŝi tradukis en Esperanton la humuran libron *Ksenofobia gvidlibro al la italoj*, kaj en 2007 ŝi redaktis la libreton *Rusoj loĝas en Rusujo* kun kontribuoj de 17 esperantistoj pri landonomoj en Esperanto. Fine de 2008 aperis ĉe Flandra Esperanto-Ligo en la Serio Stafeto ŝia originala verko *Morto de artisto* (ISBN 978-90-77066-39-3). Ankaŭ tiu romano, same kiel *La Ŝtona Urbo*, rakontas pri historio en Romo de la antikva epoko. Ŝia plej nova verko estas libreto *Konciza klarigo pri la landonomoj* (2009), en kiu ŝi klarigas, kiel funkcias la dukategoria sistemo de landonomoj en

Esperanto, kaj donas kompletan liston de landoj kaj landanoj laŭ la rekomendo de la Akademio de Esperanto en ĝiaj *Oficialaj informoj* (n-ro 11, 2009).

En 2009 Löwenstein loĝas en Italujo. Kun sia edzo Renato Corsetti ŝi

\* \* \* \* \*

Lettre d'informations Espéranto-Aktiv' : Lettre numéro 31 – Décembre 2012

## Découverte : Les revues en espéranto

Ce mois-ci, Espéranto-aktiv va faire le tour des magazines qui existent en espéranto. Depuis la revue *Esperanto* qui a été créée en 1905 et qui est toujours la revue officielle de l'association mondiale d'espéranto, jusqu'aux magazines des différentes associations nationales, il existe une grande diversité d'offre.

### Esperanto

Fondée en 1905 par Paul Berthelot, la revue a servi pendant de nombreuses années à faire connaître les différentes activités du mouvement espérantiste, et était également une source d'information sur l'actualité politique de différents pays. Il est possible de trouver sur son site internet, [www.uea.org](http://www.uea.org), quelques exemplaires anciens pour se faire une idée de son contenu.



## Le Monde de l'Espéranto

La revue de l'association **Espéranto-France** a changé de nom depuis une dizaine d'années

havas du filojn, kiuj ambaŭ estas denaskaj esperantistoj. Ŝi estas membro de la Akademio de Esperanto ekde 2001.

(elle s'appelait *Franca Esperantisto* auparavant). C'est une revue de 24 pages tout en couleur présentant au public francophone des articles en français et en espéranto sur le mouvement international, mais également sur l'actualité de l'association. L'abonnement, au prix de 18 euros par an, est indépendant de l'adhésion à l'association.

### Espéranto-Info

Autre revue française, *Espéranto-Info* vise un public qui ne parle pas encore totalement l'espéranto, avec des articles en français ou bien des articles bilingues. Elle comprend des jeux, des pages pédagogiques et beaucoup d'articles qui font le tour de l'actualité de l'espéranto.

<http://esperantoinfo.info/>

### Juna amiko

*Juna amiko* (Jeune ami) est la revue idéale quand on débute en espéranto. Elle paraît quatre fois par an et contient des textes faciles, des jeux, des bandes dessinées. Elle existe depuis 1974 à l'initiative de la ligue internationale des enseignants espérantistes.

<http://www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto/enhavo.htm>

## Literatura foiro

*Literatura foiro* (La foire littéraire) est une revue qui présente l'actualité littéraire, les écrivains, mais aussi la musique, le cinéma, le théâtre, la sociologie, la linguistique. La revue a été le fer de lance du mouvement de pensée « raumisme », qui défend l'idée de l'utilisation de l'espéranto comme vecteur d'une culture à part entière en faisant abstraction de ses qualités dans le cadre de la communication internationale.

## La Sago

*La Sago* (La flèche) est la revue de l'association **SAT-Amikaro**. Elle présente l'actualité de l'association et des causes qu'elle défend. L'association SAT-Amikaro est une association utilisant l'espéranto pour défendre la justice sociale dans les pays francophones.

<http://www.esperanto-sat.info/rubrique124.html>

## Kancerkliniko

*La Kancerkliniko* (La clinique du cancer) est une revue satirique, politique, humo-ristique. Des textes acides, des propos crus, un point de vue décalé, tous les ingrédients sont réunis pour vous mettre de bonne humeur.

## Monato

*Monato* (Le mois) est, comme son nom l'indique, un mensuel. Il



présente en espéranto l'actualité politique et culturelle mondiale. Ses articles sont très bien écrits dans un style journalistique précis. Toujours bien illustrée de photos couleur, c'est une revue incontournable pour découvrir le monde. Chacun de ses articles est écrit par des résidents du pays concerné.

## Kontakto

*Kontakto* (Contact) est la revue de l'association **TEJO** (l'association mondiale des jeunes espérantophones). Elle s'adresse à un public d'adolescents et de jeunes adultes avec des sujets qui les intéressent. Vous pouvez télécharger gratuitement un numéro de *Kontakto* en échange d'un message sur Facebook sur le site

<http://pagsocial.com/d/L.aspx>

Et retrouver toutes les informations sur le site

<http://www.tejo.org/eo/kontakto>

## La Ondo de Esperanto




Venue de Russie, *La Ondo de Esperanto* (La vague de l'espéranto) est une revue mensuelle qui couvre différents domaines, la

culture, le mouvement espérantiste. Elle met en avant les personnalités phares du mouvement espéranto.

<http://esperanto.org/Ondo/>

Kelkaj verkoj de Renée Triolle



Voilà, ce petit tour d'horizon s'achève ici. Vous pouvez vous abonner à la plupart de ces revues via l'association

Esperanto-France

:<http://esperanto-france.org/abonnements-aux-revues>



\* \* \* \* \*

## EDUKADO.NET

### Pasis 11 jaroj ekde la lanĉo - sed kiel plu?

Antaŭ 11 jaroj, la 15an de decembro 2001 ni lanĉis nian paĝaron.

La unuajn du versiojn kaj dekomence ĝis nun la redaktadon financas ESF.

La nunan, trian version ni konstruis kun la financa helpo de la membraro.

La paĝaro nun, meze de decembro havas 2760 membrojn. Ĝiaj pli ol 1000 senpagaj materialoj, ekzercoj, afiŝoj, testoj kaj artikoloj multe helpas la instruantojn dise en la mondo.

Ni fariĝis grava portalo. Krom la disponigo de materialoj ni organizas

la KER-ekzamenojn, okazigas retan instruistan trejnadon kaj disponigas plurajn retajn studformojn en la sekcio Liberaj Studoj ĉe la KLERIGEJO. La kolegoj povas trovi informojn pri libroj kaj lerniloj en nia Katalogo, trovi amikojn en la Koresponda Servo, kontaktiĝi kun kolegoj helpe de la Kurso-listo kaj en la tujmesaĝila surfaco. En la forumo estas dekoj da fadenoj kun centoj da diskutlinioj. En aparta sekcio ni kolektas informojn pri Esperanto-temaj diplumlaboraĵoj, en la Panteono estas prezentitaj pli ol cent eminentaj Esperanto-instruistoj. Pliaj

centoj da artikoloj kaj sondosieroj raportas pri metodikaj kaj lingvistikaj temoj. Pere de la novaĵoj oni ekhavas informojn pri eduk- kaj instruprojektoj kaj programoj. Kaj estas ankoraŭ multaj aliaj valoraĵoj en tiu ĉi paĝaro.

La retejo estas gvidata kaj la tiea laboro farata kaj redaktata de unu persono, mi mem, kiun porokaze helpas aliaj kolegoj, ĉefe familianoj kaj amikoj, per kontribuaĵoj, provlegado aŭ tajpado.

Sed ... Centoj, eble milo da personoj, vizitas nin regule, uzas la servojn de la paĝaro, sed lasas spurojn nenie. Multaj eĉ ensaluti ne pretas, kio vere malfaciligas al ni vidi la efikon de nia laboro. Manke de komunikado mi nur esperi povas, ke ankaŭ tiuj membroj kontentas. Kelkaj aliaj dankas min pro la laboro kaj gratulis kelkajn kolegojn pro iliaj kontribuaĵoj. Ĉi-jare nur 12 personoj helpis finance por ke mi sukcesu realigi kelkajn el la planoj, evoluigi

la paĝaron konstruigante novajn servojn.

Estus bone scii, kiom da fojoj mi sukcesis helpi, disponigi materialojn, kiam oni bezonis informojn, helpon por kursoj kaj programoj. Kiuj estas la materialoj kiujn oni ŝatis, kiumaniere ni povus eĉ pli helpi?

Sojle de la naskiĝdatreveno kaj antaŭ gravaj decidoj pri la estonteco de la paĝaro mi, Katalin, la redaktoro, simple ŝatus scii vian opinion, scii kiugrade vi bezonas la servojn kaj vidi ĉu eblos daŭrigi la laboron aŭ ne.

Ĉi-jare ni ne havos torton, ne vendas tortopecojn kaj ne organizas feston. Mi mem kaj deko da regulaj kontribuantoj de la paĝaro simple atendas kaj esperas, ke vi esprimos vian valorigon de nia laboro en la speciala loko de la [FORUMO](#) kaj trovos manieron festi nin. Ni dankemas pro ajnaj gesto kaj formo de subteno.

Amike, Katalin Kovats, redaktoro

\* \* \* \* \*

Chaque année, début janvier, des espérantistes se demandent si on doit souhaiter à ses amis *feliĉan novan jaron*, ou bien *feliĉan Novjaron*. Rappelons donc une fois de plus que l'adjectif ne peut être privé de son *a* final (car en ce cas, rien n'indiquerait qu'il est adjectif) et collé au nom. Donc, « *une nouvelle année* » ne peut se dire que *nova jaro*, en deux mots.

Pourtant, *Novjaro* est un terme parfaitement correct. Que signifie-t-il donc ?

Si on essayait, pour en trouver le sens, de lui faire le coup du *facteur commun* ? Si on supposait que ce *facteur commun* est le *o* final ? Voyons ce que ça donne : (*nova jaro*)*o*. Comment rendre en français ce *o* ? Tout simplement par un mot vide de sens, du genre *truc*, *machin*, *chose*, *bidule*... Ce (*nova jaro*)*o* est donc *quelque chose* (*o*) relatif à la nouvelle année (*nova jaro*). Que peut bien être un *truc*, un *machin*, relatif à la nouvelle année ? Très simple : c'est la *fête* du Nouvel An, le 1<sup>er</sup> janvier. La

preuve, c'est que (*nova jaro*)o devient *Novjaro*, qui s'écrit de préférence avec majuscule initiale, comme tous les noms de fêtes.

On en tire trois conclusions :

- Que la finale *o* peut, comme les autres finales, être mise *en facteur commun*.
- Que *Novjaro* n'est pas constitué de deux éléments (*Nov-jaro*), mais de trois (*Nov-jar-o*). C'est un composé *ternaire*, et non *binaire*.
- Que souhaiter à ses amis *feliĉan Novjaron*, c'est un peu vache. Cela revient à leur dire « *je vous souhaite un bon 1<sup>er</sup> janvier, mais pour les 364 autres jours de l'année, vous pouvez crever, ça m'est égal* ». Alors que si on leur souhaite *feliĉan novan jaron*, cela revient à leur souhaiter une bonne année entière, de 365 jours, éventuellement 366 si son numéro est divisible par quatre.

À ma connaissance, Zamenhof n'a pas employé *Novjaro*, mais, avec certitude, il a employé *Novmonato* « *la fête du premier jour du mois, chez les juifs, fête qui se nomme ראש חודש rōš hōdeš* », et qui s'analyse exactement de la même façon : (*nova monato*)o, o de *nova monato*, *celebrado de la nova monato*.

El André Cherpillod « La mise en facteur commun  $2(x+y)$  appliquée à la formation des mots composés.

\* \* \* \* \*

## La 98-a UKE 20-27 julio 2013, Reĵkjaviko - Islando

### Muziko / Arto



Islanda muziko kaj arto estas inspirataj de la senlima potenco de la naturo. Jon Leifs, unu el la plej konataj komponistoj de la moderna klasika muziko, forlasis tiucele la samtempan tradicion muzikan ĉeffluon kaj verkis fortecajn simfoniojn ecitajn de akvofaloj kaj vulkanoj.

Poste la speciala kaj sorĉada esprimado de modernaj muzikistoj kiel Bjork kaj Sigur Ros akiris tutmondan atenton; oni fojfoje eĉ demandas ĉu islandaj elfoj faris la muzikon. Nova muziko forte kaskadas antaŭen ĉiujare en multaj interesaj muzikfestivaloj, kiel la plej

fama festivalo *Iceland Airwaves*. La arto ne estas malpli speciala. Unu el la plej famaj artistoj de la nacio, Johannes Kjarval, prenis siajn temojn el la naturo sed ankaŭ el la trezoro de islandaj legendoj. Hodiaŭ islandaj artistoj energie plivastigas la horizonton kaj kunkonektas diversajn artajn formojn. Festivaloj kiel *Raflost* kaj *Sequences* noble atestas pri tiu kreemo. Reĵkjaviko, kie muzik-prezentaĵoj kaj artgalerioj troviĝas preskaŭ ĉie stratangule, estas koro de vivanta arto kaj kultura sceno.

### Lingvo

La islanda lingvo apartenas al la nordiaj lingvoj kaj estas la gepatra lingvo de la plej multaj loĝantoj de Islando. Ĝi estas la oficiala lingvo de

la tuta administracio en Islando. La fleksia sistemo de la islanda estas preskaŭ neŝanĝita ekde la ekloĝigado de Islando, antaŭ la jaro 900. La baza vortprovizo malmulte ŝanĝiĝis. Pro tio, islandaj verkoj ekde la unua tempo estas por la nuntempuloj facile kompreneblaj. Aliflanke, la elparolo konsiderinde pli ŝanĝiĝis ol la skriba lingvo. Islandanoj multe zorgas pri sia lingvo, kaj lingvaj aferoj ofte diskutiĝas kiam homoj renkontiĝas, kaj inter kleruloj kaj inter ordinaraj homoj. Kiam novaj konceptoj ekiĝas aŭ alvenas al Islando, plej ofte oni faras por ili islandajn terminojn bazitajn sur aliaj islandaj vortoj aŭ vortradikoj.

Tio faciligas al ordinaraj homoj kompreni tekstojn pri iu ajn temo. Pruntvortoj de aliaj lingvoj estas multe pli maloftaj en la islanda ol en la plej multaj aliaj okcidentaj lingvoj. Ĉirkaŭ kvindek terminologiaj komitatoj de volontuloj funkcias en diversaj profesioj kaj sciencoj pri farado de islandaj terminoj, ĉiu en sia kampo.

## Literaturo

Oni konas poemojn verkitajn dum la ekloĝa tempo de Islando, sed la ora periodo de literaturo estis la 13-a kaj 14-a jarcentoj. Tiam estis verkitaj i.a. *Sagaĵoj de islandanoj* kaj *Sagaĵoj de la norvegaj reĝoj*. La plej fama aŭtoro de tiu periodo estis Snorri Sturluson (1179-1241), kiu skribis kaj pri la malnova pagana religio kaj historiajn verkojn pri la norvegaj reĝoj. De tiu periodo devenas ankaŭ

la *Edda*-poemoj pri la paganaj dioj kaj antikvaj mezeŭropaj herooj. La literaturo inter 1400 kaj 1800 ĉefe estas analoj, psalmoj kaj eposaj kantoj nomataj *rimur* (rimaĵoj), verkitaj en tre komplikaj metroj. Dum la lastaj du jarcentoj internaciaj ventoj blovis en la islanda literaturo, kaj tiutempe islandanoj posedis multajn bonajn poetojn kaj aŭtorojn, ekz. Halldor Laxness, kiu ricevis la Nobel-premion en 1955. Multaj tradukoj el la islanda literaturo troviĝas en Esperanto. La plej aktiva tradukisto estas Baldur Ragnarsson.

## Esperanto en Islando

Intereso pri Esperanto troviĝis frue. La unua artikolo pri ĝi estis skribita en 1893 kaj islandanoj jam multe korespondis eksterlanden antaŭ la jarcentfino. La unua islandano en UK estis Torsteinn Torsteinsson en Kembriĝo 1907. Li ankaŭ verkis la unuan lernolibron en 1909. Kelkaj kluboj aperis en 1929-1932, sed la dua mondmilito stagnigis la movadon. Poste, en 1950, Islanda Esperanto-Asocio (IEA) estis fondita, kaj ĝi gastigis la 62-an UK-on en Rejkjaviko en 1977.

*La Tradukisto* estis literatura revuo kiu plej longe aperis, 60 numeroj de 1989 ĝis 2010. En ĝi aperis tradukoj el la islanda lingvo al Esperanto kaj inverse. Hodiaŭ la islanda movado forte daŭrigas sian longan tradicion, kion atestas la ĉiumonata kunveno de la Rejkjavika klubo "Aŭroro".

El la « unua bulteno »